



# DOKUMENTO

**Numero 09/eo**

**Februaro 2010**

NOTO: La Dokumento prezentita en la tiuj ĉi paĝoj estas kopio de dokumento eldonita en Esperanto en majo 1967 de la Palestina Liberiga Organizaĵo.

Oni korektis nur kelkajn evidentajn gramatikajn kaj tipografiajn erarojn. Ni lasis la plejmulton senŝanĝa, eĉ en lokoj kie povus troviĝi aliaj eraroj, por ke la nuna eldono estu kion eble plej fidela laŭ enhavo kaj aspekto al la originalo. La faktojn prezentitajn oni ne modifis nek ĝisdatigis.

---

**Por kontakti kun ni:**

**SAT-en-Hispanio (SATeH)**

Poŝtkesto (Apartado de correos) 8537, ES-28080-Madrid

[esperanto@nodo50.org](mailto:esperanto@nodo50.org)

<http://www.nodo50.org/esperanto>

Serio de Faktoj Kaj Ciferoj N - ro 1.

# ĈU VI SCIAS?

DUDEK BAZAJ FAKTOJ PRI LA  
PALESTINA PROBLEMO

per  
Dr. Fayez A. Sayegh

Tradukis Husen Al - Amily

**Research Center - Palestine Liberation Organization**  
**600 Sadat St, Beirut - Lebanon**

**MAY 1967**

## ĈU VI SCIAS?

1. KE, kiam la Palestina problemo estis kreita de Britujo en 1917, tiam pli ol 90% de la enloĝantaro de Palestino estis Araboj?... Kaj ke je tiu tempo, estis ne pli ol 56,000 Judoj en Palestino?
2. KE pli ol duono de Judoj enloĝintaj en Palestino je tiu tempo estis antaŭnelongaj enmigrintoj, kiuj venis al Palestino dum la antaŭaj jardekoj por eskapi de persekuto en Eŭropo? Kaj ke malpli ol 5% de la enloĝantaro de Palestino estis, indiĝenaj Palestinaj Judoj?
3. KE la Araboj de Palestino je tiu tempo posedis 97,5% de la lando, kiam, tiam Judoj (indiĝenaj Palestinanoj kaj antaŭnelonge enmigrantoj kune) posedis nur 2,5% de la lando?
4. KE, dum tridek jaroj de Brita Okupado kaj regado, la Cionistoj povis aĉeti nur 3,5% de la lando de Palestino, malgraŭ la kuraĝigado de la Brita Registraro?... Kaj ke multo de ĉi tiu lando estis transferita al cionistaj organaĵoj de la Brita Registraro rekte kaj ne estis vendita de la Arabaj Posedintoj?
5. KE, tial, kiam Britujo transpasis la Palestinan Problemon al la Unuiĝintaj Nacioj en 1947, Cionistoj posedis ne pli ol 6% de la tuta landenlimaĵo de Palestino?

6. KE, malgraŭ ĉi tiuj faktoj, la Ĝenerala Kunsidantaro de U.N. rekomendis ke «Juda Ŝtato» estu starigata en Palestino?... Kaj ke la Kunsidantaro donacis al tiu proponita «Ŝtato» ĉirkau 54% el la tuta enlimaĵo de la lando?...
7. KE Israelo tuj ekokupis (kaj ankoraŭ okupas) 80.48% el la tuta landenlimaĵo de Palestino?
8. KE ĉi tia teritoria etendigado okazis, plej multe, ANTAŬ la 15-a de Majo de 1948: t.e. ANTAŬ la ofica finiĝo de la Brita Mandato kaj ANTAŬ la eltiro de Brita Militistaro el Palestino, ANTAŬ la eniro de Arabaj armeoj por protekti la Palestinajn Arabojn, kaj ANTAŬ la Arab-Israela milito?

## ĈU VI SCIAS?

9. KE la 1947-a rekomendo de la Ĝenerala Kunsidantaro favorinta la kreadon de «Juda Ŝtato» estis ekstere de la kompetenteco de la Kunsidantaro laŭ la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj?
10. KE ĉiuj provoj deflanka de la Araboj kaj aliaj Aziaj landoj por decidigi la Kunsidantaron por antaŭmeti la aferon de «konstitucieco» de ĝia rekomendo al la Internacia Juĝejo de Justeco por «konsila opinio» de la Juĝejo estis malakceptitaj aŭ ignoritaj de la Kunsidantaro?

11. KE, kiam la Kunsidantaro komencis sperti «duajn pensojn» pri la afero kaj kunvokis en ĝia dua aparta kunsido en 1948, ĝi malsukcesis refirmdir la 1947-an rekomendon por la divido de Palestino - tielmaniere detruinte kion ajn duban leĝecon, kiun tiu rekomendo por la starigo de «Juda Ŝtato» iam ajn havis?
12. KE, tiu originale 1947-a rekomendo por krei «judan Ŝtaton» en Palestino estis aprobita, en la unua voĉdono, nur de Eŭropaj, Amerikanaj kaj Aŭstraliaj Ŝtatoj... ĉar ĉiu Azia Ŝtato, kaj ĉiu Afrika Ŝtato (escepte de la Unio de Sudafriko) voĉdonis kontraŭ ĝin?... Kaj ke, kiam la voĉdono estis ĵetita en plenpotenca kunsido je la 29-a de Novembro de 1947, urĝaj Usonaj premadoj (kiujn mem de Trumana ministraro priskribis kiel «borderantaj skandalon») sukcesis venki sur nur Azia lando (Filipinaj Insuloj) kaj unu Afrikan landon (Liberio), kiuj ambaŭ havis apartan vundeblecon antaŭ Usonaj premadoj por forlasi ilian anoncitan kontraŭstaron? Kaj ke, per aliaj vortoj, la «Juda Ŝtato» oni plantis ĉe la punkto de intersekto de Azio kaj Afriko, sen la libera aprobo de iu ajn Mez-Orienta, Asia aŭ Afrika lando, escepte de la Unio de Sud-Afriko, ĝi mem estanta regata de fremda neplenaĝo?
13. KE, Israelo restis, ajn jam ekde ĝia komencigo, absoluta fremdulo inter la elvenanta mondo de Afrik-Azio; kaj ke Israelo estis malakceptita por enlaso en

iu ajn inter-Ŝtata Konferenco de Aziaj, Afrikaj, Afrik-Aziaj; aŭ de Ne-Linigitaĵoj Ŝtatoj iam ajn okazinte?

## ĈU VI SCIAS?

14. KE, jam ekde la subskribo de la Kontraktoj de la Ĝenerala Armistico en 1949, Israelo estas konservanta ekatankan politikon de farado de militaj atakoj trans la Linioj de Limdifino de la Armistico, ripetmaniere invadante la teritoriojn de la apudaj Arabaj Ŝtatoj?... kaj ke Israelo estas ĝustatempe mallaŭdita, malaprobata aŭ kondamnata pro ĉi tiuj militaj atakoj, deflanke de la Konsilantaro de Sekureco, aŭ de la Ĝenerala Konsilantaro de U.N. je dudek okazoj-sesfoje de la Konsilantaro kaj sesfoje de la Kunsilantaro?...
15. KE, ne alia lando en la mondo, ĉu ano de la Unuiĝintaj Nacioj aŭ neano jam estis tielgrade ofte kondamnita deflanke de la Unuiĝintaj Nacioj?
16. KE, ne Araba Ŝtato jam estas kondamnita deflanke de aŭ ajn organizaĵo de U.N. pro milita atako kontraŭ Israelo (aŭ kontraŭ iu ajn alia Ŝtato)?
17. KE, krom elpelado de la plenaĝo de la Arabaj enloĝantaro de Palestino, kaj krom konstanta atakado de la apudaj Arabaj Ŝtatoj, Israelo jam ankaŭ firme ĉagrenis la rimarkantojn de la U.N. kaj

alian personaron de la Unuiĝintaj Nacioj staciataj apud la Linioj de Limdifina de Armistico: ĝi MURDIS la unuan U.N.-an Interpaciginton kaj sian militan helpinton; ĝi detenis kelke da rimarkintoj de la Batalhalto; ĝi milite okupis kaj mallaŭleĝe serĉis la Ĉefsidejon de la UN-a personaro; kaj ĝi bojkotis kunvenojn de la Miksata Komisitaro de Armistico?...

18. KE, Israelo, krome, devigis sistemon de APARTHEID (rasa distingo) kontraŭ la Araboj, kiuj restis en ilia Patrolando?... Pli ol 90% de ĉi tiuj Araboj vivas en «Zonoj de Sekureco». Ili SOLE vivas sub militama leĝo, tielmaniere limigante ilian liberecon por vojaĝi de vilaĝo al vilaĝon, aŭ de urbeto al urbeto; kaj ke al iliaj geinfanoj oni ne donas egalajn oportunaĵojn por edukado kaj oni ne donas al ili decajn oportunaĵojn por laboro, kaj la rajton ricevi «egalan pagon por egala laboro»?...
19. KE, malgraŭ la antaŭirintaj faktoj, Israelo estas ĉiam kaj ankoraŭ estas vaste portretfarata en la Okcidenta Ĵurnalaro kiel la «bastiono de demokrateco» kaj la «ĉampiono de paco» en la Mez-Oriento?
20. KE, la Okcidentaj Ŝtatoj estas persistantaj en deklaro de ilia determino por certigi tielnomatan «balancon de armiloj» en la distrikto, kiel inter Israelo, de unu flanko kaj la cent-milion-enloĝantaroj de la dektri Arabaj Ŝtatoj de la alia flanko?... Kaj ĉi tiu unilatera Okcidenta doktrino de tielnomata «balanco de armiloj» estas ne pli racia ol sugesti ke

por la Kuba-Usona konflikto devus esti tia «balanco de armiloj» kiel inter Kubo kaj Usono, aŭ ke la tuta kontinento de Afriko ne devus esti permesata akiri armilojn pli ol Sud-Afriko... aŭ ke kontinento de Ĉinujo devus ne posedi pli armilojn ol Taiwan... kaj ke nur tielmaniere povas paco esti protektebla en Okcidenta Duonsfero, en Afriko, aŭ en Azio aŭ en Eŭropo?...